Extrait de *Raportoj pri la Unua ILEI-seminario en Orienta Azio* (Rapports du premier séminaire de la Ligue des Enseignants Espérantophones en Extrême-Orient), août 2011, pp. 14-16 - Traduit de l'espéranto par Jeanne-Marie Cash.



⁽²⁾Facila vento

Apprentissage, enseignement et évaluation

L'espéranto et le Cadre européen commun de référence pour les langues (CECR)*

Historique

En 2001, le Conseil de l'Europe a publié le cadre européen commun de référence (CECR) pour l'apprentissage, l'enseignement et l'évaluation des langues. Ce cadre définit six niveaux de compétences langagières, c'est à dire comprendre et se faire comprendre tant à l'écrit qu'à l'oral. Un niveau donné correspond aux mêmes compétences quelle que soit la langue, indépendamment du nombre d'heures d'études nécessaire pour atteindre ce niveau.


Il est à noter que le CECR n'évalue que les compétences à utiliser une langue pour comprendre et se faire comprendre, tant à l'écrit qu'à l'oral. Il n'évalue pas d'autres compétences liées comme la culture portée par la langue, la compétence à enseigner la langue, ou la capacité à traduire ou à interpréter de et vers la langue concernée.

Dix ans après sa création, ce système de niveau est aujourd'hui largement reconnu, non seulement en Europe, mais également en dehors de l'Europe. Ce succès s'explique en grande partie du fait que ce système apporte une base de

référence commune, quels que soient la langue ou l'organisme d'enseignement ou d'évaluation, en comparaison avec la multiplicité des grilles de niveaux existant jusqu'alors et bien souvent spécifiques à chaque langue et à chaque organisme.

De fait, la plupart des organismes d'enseignement et d'évaluation des langues se sont déjà alignés ou sont en train de

s'aligner sur ce système d'évaluation.



L'importance du CECR pour l'espéranto

Alors que l'intégration, fin 2008, de l'espéranto au sein du CECR apporte la reconnaissance officielle qui était tant attendue chez les espérantophones, l'adaptation du mouvement espérantophone, y compris en France, à cette nouvelle situation est restée très limitée. Il est vrai que cette reconnaissance officielle, que beaucoup d'espérantophones français espéraient obtenir par la création d'une option espéranto au baccalauréat, est arrivée de façon assez discrète et inattendue.

Cette intégration au CECR constitue néanmoins un véritable tremplin pour l'espéranto. D'une part, dès 2012, les futurs enseignants de l'Éducation nationale devront présenter un diplôme de langue d'un niveau au moins égal à B2 pour obtenir leur titularisation. D'autre part, l'un des objectifs de l'Éducation nationale est que les titulaires du baccalauréat aient un niveau au moins égal à B2 dans une langue vivante.

Compte tenu de ces éléments, de la réglementation européenne qui impose une reconnaissance croisée des diplômes entre États membres de l'Union européenne et que toute discrimination

linguistique pourrait être déclarée non conforme par la justice européenne, l'intégration de l'espéranto au sein du CECR constitue une avancée majeure pour l'espéranto, avancée sur laquelle le mouvement espérantophone doit désormais concentrer une grande partie de ses efforts.

Promotion de l'espéranto au travers du CECR

Maintenant que l'espéranto dispose d'un cadre officiel de reconnaissance, nous devons commencer par utiliser le CECR, tant pour le référencement des niveaux de nos cours, que pour l'évaluation des compétences en espéranto. Nous devons montrer que l'espéranto est une langue vivante en affichant nos cours par rapport aux niveaux du CECR, aujourd'hui universellement connus des élèves, des étudiants et du monde enseignant.

En montrant aux apprenants potentiels que l'espéranto est une langue vivante car référencée au CECR, nous pourrions générer un intérêt pour la langue elle-même, puis pour son apprentissage, et enfin pour passer des examens officiels.

Les examens d'espéranto et le CECR

Comme pour toutes les autres langues, les organismes d'enseignement et d'évaluation de l'espéranto utilisaient jusqu'alors leurs propres systèmes de niveau et d'évaluation. Ainsi la ligue internationale des enseignants d'espéranto (ILEI : Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj) avait créé sa propre grille de niveaux (Elementa, Meza, Supera). De même, l'Institut français d'espéranto (FEI : Franca Esperanto-Instituto) avait également créé son propre système, sur lequel était fondé

Les six niveaux de compétences du CECR :

- A1 : niveau découverte,
- A2 : niveau survie,
- B1 : niveau seuil,
- B2 : niveau autonomie,
- C1 : niveau efficacité,
- C2 : niveau maîtrise.

(* en espéranto, Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj (KER))

notre système de niveaux pour les cours. Il est à noter que ces systèmes combinent différents types de compétences dont la capacité à utiliser la langue, connaissance culturelle et même compétence en traduction de et vers le français pour le niveau supérieur de FEI.

Ces systèmes avaient les défauts de tous les systèmes antérieurs au CECR, quelle que soit la langue, à savoir :

- des grilles de niveau ne permettant pas de comparaison entre langues et entre organismes,

- une reconnaissance liée à la renommée de l'organisme délivrant les diplômes, de fait pour l'espéranto une reconnaissance quasi-nulle en dehors du mouvement espérantophone.

Fin 2008, après plusieurs années de travail, l'institut des langues étrangères de l'université Eötvös Loránd (ELTE-ITK) de Budapest, a obtenu la certification européenne pour l'organisation d'examens d'espéranto et la délivrance des diplômes associés pour les niveaux B1, B2 et C1. Comme pour le hongrois langue étrangère, autre langue pour laquelle ITK dispose de la certification européenne, l'examen d'espéranto se déroule uniquement en langue-cible ce qui permet à n'importe quel espérantophone quelle que soit sa langue maternelle de le passer. Des sessions d'examen sont organisées périodiquement dans le centre agréé de ELTE-ITK à Budapest, et, grâce à un accord avec UEA, lors de sessions organisées ponctuellement lors de rencontres espérantophones.

Structure des examens CECR d'espéranto

Les examens CECR d'espéranto sont disponibles pour les niveaux B1, B2 et C1.

Pour chaque niveau, l'examen se compose de deux parties, une partie orale et une partie écrite. Chacune de ces deux parties est indépendante. Il est possible de les passer séparément ou simultanément, sachant que chacune est évaluée séparément. Pour être certifié dans un niveau, il est nécessaire de réussir à l'oral et à l'écrit. En cas d'échec à l'une des parties,

le succès dans l'autre partie reste acquis et il n'est nécessaire de repasser que la partie dans laquelle on a échoué.

Quel que soit le lieu de l'examen, y compris en Hongrie, il se déroule entièrement en espéranto, y compris pour les consignes écrites ou orales.



Coûts et subventions des examens CECR d'espéranto

L'organisation des examens dans un cadre officiel génère des charges qui se répercutent sur le coût des examens. Ainsi pour les examens passés lors des sessions organisées par UEA (contractant de ELTE-ITK), pour les personnes résidant en France, les tarifs sont :

- B1 : 68 euros,
- B2 : 74 euros,
- C1 : 84 euros.

Le tarif est de moitié si le candidat ne passe qu'une seule partie (oral ou écrit).

Les tarifs pour les examens se déroulant dans le centre agréé ITK de Budapest sont plus élevés.

Si ces coûts sont sensiblement moins chers que pour des examens équivalents dans d'autres langues, ils sont cependant nettement plus élevés que ceux de l'ancien système. De plus, ils ne bénéficient pas de la prise en charge partielle ou totale dont peuvent bénéficier certains étudiants au cours de leur scolarité dans la mesure où il n'existe pas de centre d'examen agréé en France pour l'espéranto.

Afin de remédier à cette situation et compte tenu de l'importance du CECR

pour l'espéranto, Espéranto-France a décidé d'accorder une subvention pour les candidats aux examens de niveaux B2 et C1. La subvention de base est du tiers du montant de l'examen, et la subvention pour les jeunes (moins de trente ans) est de deux tiers. Ainsi le coût effectif est de :

- B2 : 49 euros (24 euros pour les jeunes) au lieu de 74 euros,
- C1 : 56 euros (28 euros pour les jeunes) au lieu de 84 euros.

Il est à noter qu'une subvention est également accordée à ceux qui auraient besoin de passer l'examen dans le centre agréé de Budapest. Pour cela, se renseigner au siège d'Espéranto-France.

Vers un centre d'examen CECR agréé pour l'espéranto en France ?

La mise au point d'un système certifié d'examen de langue conforme au CECR exige un investissement considérable, tant sur le plan humain que financier. Ainsi, l'institut des langues étrangères de Budapest qui dispose pourtant d'une expérience de plus de quarante ans dans

Klubo 2000

Les dons faits au « Klubo 2000 » pour l'année 2011/2012 permettront de subventionner les examens CECR. Un reçu fiscal sera délivré aux donateurs. Pour bénéficier de la réduction d'impôts en 2012 (revenus de 2011), le don doit être versé avant fin 2011.

le domaine des examens de langues, qui emploie cinquante permanents et coordonne un millier d'examineurs, qui compte chaque année plus de 100.000 candidats à un examen de langue dans trente langues différentes, qui avait déjà l'espéranto à son catalogue et l'expérience du CECR avec le hongrois langue étrangère, a eu besoin de plusieurs années de travail pour pouvoir proposer des examens certifiés d'espéranto dans le cadre du CECR. Un tel investissement n'est envisageable que pour un organisme officiel pouvant espérer plusieurs milliers de candidats par an, pour rentabiliser son investissement.

Pour autant, il existe une solution intermédiaire permettant à un organisme officiel de proposer un examen dans une langue nouvelle. Il lui est possible de contracter avec un autre organisme officiel qui dispose déjà de cette langue à son catalogue. Ainsi dans le monde, quelques centres d'examens ont obtenu l'agrément de ELTE-ITK pour proposer des examens de hongrois langue étrangère, examens qui sont organisés avec le soutien d'examineurs de ELTE-ITK. Sur ce modèle, pourrait-on envisager

qu'un organisme d'examens français passe un accord avec ELTE-ITK pour ouvrir un centre d'examen agréé pour l'espéranto en France ?

La réponse est une question de masse critique. Pour qu'un centre d'examen s'intéresse à la question, il doit pouvoir compter sur un flux régulier et suffisant de candidats, de l'ordre de plusieurs centaines par an.

Nous devons agir pour générer un tel flux annuel de candidats à un examen CECR d'espéranto.

Quel avenir pour les examens autres que le CECR ?

En l'absence d'examens officiels, le mouvement espérantophone avait mis en place un système spécifique pour pallier cette carence. Maintenant que des examens officiels existent et que tous nos efforts doivent être centrés sur ces examens officiels, que faire du système d'examen existant, des examens de FEI en France ?

Comme nous l'avons vu, les examens officiels du CECR permettent d'évaluer

les compétences langagières des candidats.

Si ces compétences constituent un élément essentiel de la pratique d'une langue, il reste cependant un certain nombre de compétences importantes non évaluées par le nouveau système : la culture espérantophone, la capacité à enseigner l'espéranto, ou la capacité à traduire ou à interpréter de et vers l'espéranto. Le système d'examens propre au mouvement doit pallier les manques du système officiel, et se réorganiser en conséquence.

Un autre élément à prendre en compte est l'absence d'examen pour les niveaux A1 et A2 et la nécessité pour les futurs candidats aux examens officiels de pouvoir s'entraîner et évaluer leur niveau avant de passer des examens relativement coûteux et dont les sessions sont rigoureusement planifiées. Ce besoin invite à réfléchir à un possible calibrage des examens de premier et deuxième niveau de FEI par rapport au CECR afin de faciliter cette préparation des apprenants et futurs candidats des examens CECR.

Didier JANOT

Komuna programo kun aliaj asocioj

Kunveno "Laborgrupo pri interasocia kunlaboro"

Kadre de IREM 2011 okazis kunveno pri la ĉi-supra temo.

Notindas, ke la okazinta interasocia kongreso estas la kulmino de pli ol dek kvin jaroj da klopodoj, kunvenoj, ktp.

En 1995, post jam plurjara periodo da pripensado inter junaj komitatoj de UFE kaj JEFO, Denis Flochon intencis organizi "interasocian kongreson" en Liono. Bedaŭrinde tiam tiu revo ne realiĝis. Poste estis kreita "Interasocia Komisiono pri Kunlaboro" por okazigi regulajn kunvenojn, unue inter SAT-Amikaro kaj UFE kun la intenco pliampleksigi la partoprenantaron estontece, cele al difino de la kunlaboraj kampoj kiuj profitus tiel al ambaŭ asocioj kiel al la movado kaj la bono de Esperanto. Evidente "komuna kongreso interasocia" estis ideo laŭdata

de la plejmulto. Ofte mi ricevis leterajn gratulojn de malnovaj esperantistoj, kiuj pledis por forgeso de la malnovaj kvereloj kaj antaŭeniĝo al pli "zamenhofa sinteno" en la rilatoj inter la asocioj, des pli ke ili ofte membris en ambaŭ aŭ eĉ pli.

Sub la prezidanteco de Claude Longue-Epée, la komisiono IKK regule kunvenis kaj dank' al liaj energio, sindediĉo kaj diplomateco, ĝi fruktodonis.

Finfine pro la allogo de la jubileo, okazis - post dek jaroj ! - "Interasocia renkontiĝo" en Bulonjo ĉe Maro dum Pasko 2005. Kiom da "paco kaj scienco" - pacienco ! -

Se la nombro estas signo de sukceso, memorindas la rekorda partoprenantaro. Tiam mi pledis okaze de membrokunvenoj de la asocioj por reguligo de tiaj renkontiĝoj ĉiun trian jaron.

Dum la kunveno IREM 2011, la partoprenantoj estis invititaj cerbumi pri la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de komuna kongreso kaj pri laŭorda klasifiko de la plej gravaj kampoj de interasocia kunlaboro difinitaj de la partoprenantoj. Jen la rezulto:

- Avantaĝoj de komuna kongreso:
- ŝparo de tempo kaj mono se nur unu vojaĝo por partopreni al 2 au pli da asociaj kongresoj,
 - pli bunta kaj alloga kulturprogramo,
 - pli ampleksa partoprenantaro pli impresas alekstere kaj ankaŭ al novaj kongresantoj.

Malavantaĝoj de komuna kongreso: Ununura kongreso ne ĉiam povos okazi en centra parto de Francio do malallogos la plej forajn esperantistojn kvankam se

Rencontres de jeunes

Festo, Festo, Festo !

« **L** 'espéranto ? Ah oui, c'est un projet qui n'a pas fonctionné », « Pourquoi j'appréhendrais une langue que personne ne parle ? », etc. Tous les jeunes espérantophones, parlant à d'autres jeunes de la langue équitable, ont entendu mille fois ces réponses, qui empoisonnent l'idée interne. La bonne nouvelle est que l'antidote est désormais disponible, il suffit de faire venir les jeunes en question au Festo (la prochaine édition aura lieu en août 2012 près de Lyon). Là, au cri de ralliement de « Festo ! Festo ! Festo ! », les membres de JEFO leur feront comprendre que le mou-

vement est bien vivant, quitte à payer de leur personne en amusant la galerie et surtout les nombreux enfants, espérantophones natifs souvent issus de couples mixtes, venus avec leurs parents.

En effet, au Festo 2011, organisé au château de Grésillon, toutes les générations étaient représentées : le participant le plus âgé avait 80 ans, et le plus jeune... 3 mois ! La très grande majorité d'entre eux étaient âgés de moins de 40 ans, preuve que, pour un « projet disparu dans les années 70 », l'espéranto se porte bien. On remarquait même de nombreuses étoiles

vertes sur les badges, qui signalaient les débutants qui participaient à leur premier congrès.

De nombreux pays étaient représentés, pratiquement tous les pays d'Europe et même... l'Australie !

Un pari réussi pour les membres du bureau d'Espéranto-Jeunes qui ont souhaité créer un congrès international où chacun mettrait la main à la pâte pour faire vivre pendant une semaine cette communauté d'une centaine de personnes, tous espérantophones – les personnes qui ont aidé les organisateurs ont bien sûr reçu une réduction importante du prix (déjà très modique) de la cotisation.

Les temps forts de la semaine étaient bien sûr les concerts, organisés chaque soir avec des musiciens différents venus eux aussi de toute l'Europe, diffusés par le label Vinilkosmo, et représentant tous les styles musicaux, dont 42 et Inicialoj DC (Allemagne), Gijom, Platano et FaMo (France), Rêverie (Italie), les seuls à ne pas chanter en espéranto étant le groupe local Scarlet (Angers). Le groupe suédois La Perdita Generacio, particulièrement motivé à l'idée de remplacer Jonny M. au pied levé, a donné deux concerts, le deuxième comportant plusieurs morceaux inédits écrits pendant le congrès, car Festo est aussi un lieu d'inspiration et de talents. D'ailleurs, la dernière soirée, appelée « Internacia Vespero » (soirée internationale) a permis à chacun de faire preuve de son talent en montant sur scène à son tour. Une occasion de plus de remarquer à quel point les espérantophones sont d'horizons divers et de goûts différents et complémentaires.

Pour tous, rendez-vous est pris l'année prochaine près de Lyon, en emportant dans ses valises instruments de musique et bonne humeur ! Rejoignez-nous !

Marie Angèle Prétot
www.marie-angele-pretot.com



estas kunlabora etoso inter la asocioj, eblas elekti kongresejojn diverslokajn kiuj ebligas partoprenon al pli da esperantistoj, t.e. maljunaj kiuj ne emas longvojaĝi, junaj kaj aliaj kiuj ne havas la monrimedojn, ktp.

Same pri dato kiel pri loko. Se estas kongreso ĉu dumpaske ĉu dumpentekoste, pli da homoj havos la eblecon partopreni.

Laŭorda klasifiko, iom rapide farita do indika sed ne science ellaborita, de kampoj de asocia kunlaboro :

1. komuna fondaĵo por heredaĵoj,
2. naciaj peticioj,

3. komuna gazeto,
4. komuna diskonigo de informoj : datumbazo pri kursoj, eventoj, informfontoj, retlisto pri kunlaboro ?
5. prelegvojaĝoj
6. eldonado komuna
7. FEI
8. rilatoj kun politikistoj
9. elekto de kongreslokoj

Tiuj kiuj pretas kunlabori pri tiuj diversaj kampoj povas kontakti min.

Philippe Chavignon
werphatao@hotmail.com

Movado

Kio estas esperantista renkontiĝo ?

Tiu demando revenas de tempo al tempo, ofte ligita al la plej grava demando « Kie ni povas uzi Esperanton? ». Ĉar vi foliumas postsomeran numeron de tiu ĉi gazeto, gravas kompreni, kio estas esperantista renkontiĝo. Ni difinu kelkajn kriteriojn.



Unue, kial venas homoj al tia renkontiĝo ? Venas homoj kiuj havas komunajn interesojn. Ĉies celoj kongruas kun ideo de justeco, libereco aŭ ia sendependeco. Due, kiu venas al tia renkontiĝo? Renkontiĝas homoj plurgeneraciaj, sed plimulto estas aŭ junuloj kiuj ankoraŭ liberas aŭ emeritoj kiuj nun havas tempon.

Trie, kiel ili aspektas ? Male al normala homo, la ĉeestantoj surmetas ne-kutimajn t-ĉemizojn, kiujn ili uzas por varbi pri siaj ideoj.

Kvare, kiel ili komunikas ? Ili uzas komunan lingvon Esperanto.

Komence de julio, mi partoprenis al RMLL (Monda Renkontiĝo de la Liberaj Programaroj). Tiuj homoj celas liberiĝon de la ciberspaco kaj ties loĝantaro. Krom kelkaj entreprenoj, la ĉeestantaro tre similas al la verda popolo, tamen ĝi estas iom pli juna kaj multe pli ekranema. Videblas t-ĉemizoj pri gnuoj, pingvenoj, vulpoj, kiuj elvokas liberajn programarojn. Kun alia esperantisto, mi provis antaŭenpuŝi la internacian lingvon en tiu medio sed ni surprize frontis al mensoj sufiĉe obtuzaj kaj blokita. Tiu medio ne estas tiom libera kiom ĝi pensas esti.

Meze de julio, mi vojaĝis al REF, la renkontiĝo de esperantistaj familioj. Komuna intereso estas feriado kun denaskaj infanoj, kun la gepatroj kaj eĉ kelkfoje kun la geavoj. La afero daŭras ekde multe da jaroj. Baldaŭ eble venos la unuaj infanoj kiel nuntempaj gepatroj kun dua generacio da REFaj infanoj.

Ni komune havis belan kolekton da t-ĉemizoj esperantistaj. Notindas ke la « oficiala lingvo de antarkto » plu vekas entuziasmon ĉu de esperantistoj ĉu de ne-esperantistoj.

Tuj post REF, mi estis invitita al Freiburg de lokaj esperantistoj por partopreni en somera universitato, kies nomo estas ENA, de la movado ATTAC. Okazis, ke ATTAC mem petis al nia movado okazigi 4 kursojn de Esperanto dum tiu 4-taga renkontiĝo. Dufoje trihora ateliero, gvidata de belgo, germano kaj franco, traktis lingvajn problemojn kaj iliaj disvastiĝo kaj influo sur politika debato, merkatoj ktp. Okazis komparo inter la mezepoka latino kaj la nuntempa internacia anglaĵo. Iu preleganto eĉ pritraktis la raporton de Grin sufiĉe detale kaj substrekis la avantaĝojn de Esperanto. Tio evidente vekis demandojn en la 60-homa ĉeestantaro, kaj tiam ni esperantistoj povis respondi kaj atesti per niaj spertoj. Mi ekzemple devis klarigi ke ekzistas denaskuloj sed ne ekzistas indiĝenoj de Esperanto. Tiel

ni ne prezentis niajn kutimajn ideojn kaj ni povis tamen ĝustigi kelkajn detalojn. Entute 1300 personoj partoprenis en la somera universitato. Ĉiuj vidis la internacian koruson dum la sabata solena kunveno kaj 60 personoj serioze diskutis pri Esperanto dum la du atelieroj. Deko eĉ lernis la lingvon kun Alois Eder kaj Ursula Niesert. Tiel ni atingis 1 % da parolantoj fine de la renkontiĝo. Ĉu tio sufiĉas por konsideri tiun aranĝon kiel Esperanto-aranĝo ?

Ni tamen faru seriozan komparon per para skalo.

Konsiderante la kriterion, la aranĝo kongruas :

neniel	Parte ne	Parte jes	Tute
0 poento	25 poentoj	75 poentoj	100 poentoj

Vidu figuron 1, la tri renkontiĝoj havas 300 poentojn kaj estas do same esperantistecaj !

Cyrille Hurstel

Figuro 1, komparo de la tri renkontiĝoj :


Aranĝo	Kriterio 1 Kialo kunveni	Kriterio 2 Kiuj homoj	Kriterio 3 Kiel ili aspektas	Kriterio 4 Kiel ili komunikas
RMLL	100 poentoj	100 poentoj	100 poentoj	0
REF	75 poentoj	25 poentoj	100 poentoj	100 poentoj
ENA	100 poentoj	100 poentoj	75 poentoj	25 poentoj

Brassens plu !

Jacques Yvart ĵus registris novan diskon kunlabore kun Vinilkosmo. Ĝi nomiĝas «Brassens plu» kaj estas komplete dediĉita al kanzonoj de Brassens tradukitaj en Esperanton. Gxi enhavas 13 titolojn kaj daŭras entute 40 minutojn. Jacques Yvart fakte jam aperigis en 1998 diskon kun kantoj de Georges Brassens en Esperanto, kaj aperigis lastjare en franca lingvo la saman diskon kiel ĉi jare en Esperanto. Sed tiu ĉi nova disko estas aparte interesa, ĉar ĝi estas sintezo de longa laboro pri Brassens kaj entenas ĉion, kion li daŭre laboradis dum la lastaj jaroj. Oni tie retrovas ses kantojn de la disko aperinta en 1998, kiuj estis remastrumitaj aŭ denove registritaj. Tio rezultigas rimarkindan pliboniĝon kiu estas tehniko kaj muzike ankoraŭ pli bela ol en la unua versio. Plie, troviĝas novaj kantoj, kiujn tradukis elstaraj esperantistoj (Marcel Redoulez, Michel Duc Goninaz, Roel Haveman, ktp.). Por francaj esperantistoj, ĝi estas ege konsilinda disko. Gxi estas lerte kantita kaj bone artikulaciita. Se oni ja ofte kaj prave povas riproĉi al francaj kantistoj, ke ili ne sufiĉe bone prononcas Esperanton kiam ili kantas, oni ne povas tion diri pri Jacques Yvart. Cxio estas klara kaj

flua, respekte al la stilo de Brassens, ĉe kiu ege gravas la signifo de la teksto. Por tiu kiu deziras lerni Esperanton per kanzonoj, tiu disko estos bona ekzerco por ekzerciĝi. Kaj por la lertaj skribaj esperantistoj kiuj neglektas la parolan lingvon, ĝi estos ankaŭ bona ekzerco por lerni, kiel bone kaj klare paroli. Por nefrancaj esperantistoj, ĝi estas ankaŭ konsilinda disko, kiu konatigos al ili la stilon de grava kanzonverkisto el la lasta jarcento, kantita de altvalora kaj kvalita artisto, kiu estis mem amiko de Brassens.

La lasta kanzono de la disko, Milito, estas nekonata de la franca publiko, kaj Jacques Yvart revivigas ĝin en stiloplena versio, sen gitaro, nur kun akompano de kalkanumbruj kaj vira ĥoreto blekanta, kiuj plej ironie reliefigas etoson de armeo brue marŝanta sur pavimo. La fajneco de tia aranĝo troviĝas ankaŭ en la aliaj kanzonoj, ĉar Jacques ne kontentiĝas per simpla imitado de la stilo de Brassens (voĉo kun akompano de ritmaj gitaroj, diskretaj per ĉefe simplaj akordoj, kaj unu kontrabaso kiu profundigas la harmonian senton), li pliriĉigas ĝin per propra estetiko laŭ siaj artaj konceptoj kaj muzikaj serĉadoj. Li ekzemple registris version de La eta ĉevaleta laŭ kantria stilo, ege kongrue kun la temo de la kanzono. Laŭ la sama ideo, li registris belegan version de En akvo de la klara fonto, en kiu li uzas la sonojn de la kelta harpo por imiti spruĉon de akvogutoj kaj bruon de fluanta akvo. En Povra marten' troviĝas solo de saksofono kiu kortuŝe referencas al ĵaz-bluzo estetiko, tute kohera kun la senco de la teksto. Efektive, ĝi estas kanto pri la mizero de la kamparanoj. Kiel pli bele pliprofondiĝi en la temo ol substreki ĝin per muzika stilo kiu origine venas el la sklavo de



la usonaj kamparoj kaj referencas al ilia mizero?

Oni ankaŭ ne forgesu, ke Jacques Yvart spertas pri maristaj kantoj, kaj ni des pli intense ĝuas lian version de La marista am', kiun li plej plezure kantas por ni akompane de akordiono, tipa instrumento de maristaj kantoj. Plie, vi povos aŭdi propran version de la fama kanzono Johano la ne avertinto, kiun Jacques mem komponis por Brassens.

Fine, ni agnosku ke la kantiston ĉirkaŭis ege lertaj muzikistoj kaj tehnikistoj, kiuj altigas la kvaliton de la disko per sia profesinivela laboro.

Tiu disko entenas karaokean version de ĉiuj kantoj (en MP3-formato), tiel ke la kantemuloj kantu mem la tekstojn, kiuj troviĝas en la disko. La disko enhavas plie muzikvideon de la registrado de La marista am' en la studio de Vinilkosmo. Konklude, tiuj kiuj ŝatas tian muzikon nepre mendu la diskon. Tiuj kiuj ne ŝatas tian muzikon aŭ ne deziras aŭskulti la diskon simple ne scias kion ili perdas.

Lino Markovo

Kompaktdisko 16€10 mendebla ĉe nia libroservo.



Brassens Plu



Vinilkosmo.com

en bref • mallonge

● Por verkemuloj !

Kiel pasintjare, la asocio Esperanto-Vannes (www.esperantovannes.fr) invitas vin partopreni en la beletra konkurso Litera Turo 2012. Ĝi konsistas el 3 branĉoj, originalaj prozo, poezio, kaj traduko el la franca.

Limdato : 18^a de decembro 2011. La regularo kaj la tradukenda teksto elŝuteblas je la suba adreso. Por anonci vin aŭ peti pliajn informojn aŭ konsilojn, bv. kontakti litera-turo@live.fr

(info : Matjo)

Vojaĝo al Nepalo

Mi partoprenis kun mia edzino la 9^{am} Internacian Himalajan Renkontiĝon, kiu okazis en Nepalo de la 26^a de februaro ĝis la 8^a de marto. Grupo de 30 ne-nepalanoj – ĉefe francoj (sep venis el « Pluezek » pro la vizito kaj reklamo de Poshraj Subedi lastan someron dum la 14^{aj} pluezekaj renkontiĝoj), naŭ japanoj (Hori Jasuo jam partoprenis plurfoje tiun IHR), du paroj el Mongolio kaj Svedio kaj unu dano – admiris la mirindajn kaj impresajn montarojn kaj frandis la amikan etoson. La nepalanoj bonege organizis ĉion, dankegon al NEspA (Nepala Esperanta Asocio), kaj gratulojn al ĉiuj bonvolemluloj, kelkfoje pli ol dek, kiuj ofte akompanis nin kaj ebligis en ĉiu dua jaro tiun turisman kaj esperantan aranĝon.

Montaroj kaj valoj. Trifoje ni vekiĝis frumatene, je la 5a kaj duono, por admiri la sunleviĝon super la mirindaj pintoj. Unue aperas rozkoloraj neĝoj, poste la ruĝa suna disko majstre aperas super la montara baro, fine blankaj eternaj neĝoj lumas pro la suno. Verŝajne unu el la plej belaj senpagaj spektakloj, kiujn mi iam spektis ! Piedmigrante dum kvar tagoj tra nacia parko proksime al Katmanduo, ni ĝuis tian spektaklon en Nagarkot (Langtang Baron), kaj post tiu IHR, de la 9a ĝis la 12a de marto, dum la tritaga ekskurso al la turisma urbo Pokhara, kiun ni atingis post tuttaga vojaĝo per tipe nepala buso. Kelkaj francoj iomete fieras antaŭ Anapurna (fakte estas 4 pintoj kiuj nomiĝas



tiel), la unua « pli ol 8000-metra » kiun iam sukcese surgrimpis homo, la franco Maurice Herzog en 1950. Iom poste, la 29an de marto 1953, ŝerpo Tenzing Norgay kaj tuj malantaŭ li la novze-landano Edmund Hilary venkis la plej altan pinton en la mondo, Monto Everest, Sagarmatha por la nepalanoj, Ĉomolungmo aŭ Patrino de Universo laŭ la tibetanoj. La valo de Katmanduo, je alteco de ĉirkaŭ 1.300 metroj super la marnivelo, entenas la ĉefurbon Katmanduo ege riĉa je temploj kaj vidindaĵoj. Ĝi estas ankaŭ la komerca kaj kultura centro de Nepalo. Ties klimato estas milda, malvarmeta dumnokte kaj mezvarma dumtage dum tiu plej agrabla turisma sezono inter oktobro kaj aprilo.

Grenoj kaj terpomoj. Dum mia infanaĝo, mia patro ĉiutage zorgis post sia ofica laboro pri ege granda legomĝardeno, ĉiam postulante la helpon de siaj du knaboj. Ni bredis ankaŭ ŝafojn, kuniklojn kaj diversajn kortobirdojn, do laboro ne mankis! Pro tio, mi multe respektas tian ofte penigan kultivadan laboron. Ege impresas min la terase kultivataj montodeklivoj ! Mi ja povas aserti, ke la nepalaj gekampanoj estas ege lertaj zorgante pri tiaj terasaj kampoj kaj ties akvumoj kaj tre kuraĝaj portante ĉion

surdorse (t. e. diversaj rikoltoj, brulligno kaj eĉ sterko) pro la krutaj vojetoj kaj ties multnombraj ŝtuparoj. Ili kapablas rikolti dufoje jare grenojn (ĉefe rizon dum la malseka sezono kaj poste tritikon, hordeon, milion aŭ maizon), eĉ pli ofte

se temas pri diversaj legomoj (brasikoj, faboj, fazeoloj, flor-brasikoj, karotoj, lentoj, ternuksoj, tomatoj, terpomoj, ktp.).

Bovoj kaj bubaloj. Bovoj estas sanktaj por hinduoj ! La

bovinojn oni ame bredas por la lakto sed kion fari pri la virbovoj ? Lasi ilin vagadi tra urboj sin nutrante ofte per rubaĵoj ! La hinduoj ne rajtas buĉi bovojn kaj manĝi bovaĵon, sed nepalanoj tamen manĝas



bubalojn. Ĉi tiuj similas al bovoj sed kun pli etaj kaj kurbaj kornoj. Kamparanoj jungas tiujn dombestojn por plugi per unusoka plugilo la inunditajn kampojn aŭ por tiri ĉarojn kaj fine kaj verŝajne rekompence buĉas ilin. Foje post tute ne agrabla vojaĝo per kamiono al la buĉejo (nia buso sekvis dum kelkaj kilometroj tian kamionon sur montara vojo, kie do estis B. Bardot ?).

Homoj kaj dioj. Kiom afablaj estas la homoj ! « Namaste! ». Ĉiam kaj ĉie, plej ofte kun afabla rideto ili tiel salutas vin, kvankam ili pene laboras tuttage por sinnutri, kontraŭ nur kelkaj centoj da rupioj. Viro laboranta en domkonstruado en Katmanduo lukras tage inter 500 kaj 800 rupiojn (laŭ la nuntempa kurzo unu eŭro valoras 98 rupiojn, unu dolaro 72 rupiojn).

La virinoj portantaj surdorse plenajn sakojn da brulligno aŭ da aliaj varoj, preskaŭ nudpiede sur la krutaj montaraj vojetoj, ja impresas min, kiel mal-



novan trejniston pri sporto : vere lertaj ĉampioninoj ! Multaj dioj kaj diinoj en hinduismo. Ni ricevis multajn informojn de niaj nepalaj amikoj, tamen mi ne profitis la vojaĝon por iĝi spertulo pri ili aŭ pri kasto. Ni ankaŭ vizitis, post tuttaga busa vojaĝo sur pitoreska montara vojo, kie svarmis kamionoj kaj aŭtoj, piedirantoj kaj bestoj, ĉaroj kaj traktoroj, busoj kaj plenplenaj busetoj, la urbon Lumbini apud la limo kun Hinda Unio. Tiu urbo, naskiĝloko de Siddharta Gautama, la fondinto de Budhismo (vivinta de 623 ĝis 543 antaŭ Kristo) estas unu el la kvar plej gravaj pilgrimejoj rilate al la vivo de Budho kaj estas sur la Listo de Mondheredaĵoj de Unesko ekde 1997. Nuntempe multaj nacioj celas tie konstrui la plej altan, grandan, luksan aŭ taŭgan templon je la honoro de tiu homo, kiu proponis ke ĉiu homo vivu simple kaj senriĉe por atingi « sian celon kaj feliĉon ». Pli proksime al Katmanduo



kiom da belaj lokoj kaj temploj ege vizitindaj i.a. Bhaktapur, Darbar (palaco en la nepala) de Patan, stupao de Bodhnath, Taleju-templo de Basantapur, Swayambhunath, ktp.

Kompreneble, mi kunportis kelkajn albumojn de « Tinĉjo en Tibeto » kaj sufiĉe da ekzempleroj de mia verko « La bildstrio kiel

lernolibroj » por donaci al niaj nepalaj amikoj. Mi sukcesis prelegi en Lumbini, okaze de libera mateno pro buspaneo, pri « Tinĉjo en Nepalo ». Fakte la triono de tiu aventuro « en Tibeto » okazas en

Nepalo, kaj Hergé, dank'al tre fidindaj fontoj kaj dokumentoj tre bone prezentis siajn « tipe nepalajn » anekdotojn. Cetere en pluraj butikoj de Katmanduo, vi povas mendi al la deĵoranta tajloro ke li brodu iun bildon de « Tinĉjo en Tibeto », el la dek proponitaj, sur via to-ĉemizo. Kia neforgesebla vojaĝo !

Vivu Esperanto ! Vivu Esperanto en Nepalo ! Vivu la deka IHR !

Niaj japanaj amikoj ne partoprenis la postrenkontiĝon, ili reiris hejmen nur du tagojn antaŭ la fortega tertremo kaj ties teruraj sekvoj kun mortintoj, giganta cunamo kiu mortigis ankoraŭ pli da homoj, kaj precipe damaĝis tiun atomcentralon, antaŭ-anoncante oni ne scias kiom da ontaj viktimoj. Ni tutkore kondolencas ĉiujn niajn japanajn gefratojn.

Michel DECHY

Fotoj : Hélène kaj J.C. Dubois



**Bienvenue
à St-Aignan
de Grand
Lieu !**

Du 25 AU 29 MAI 2012 À ST-AIGNAN DE GRAND LIEU (44)

Congrès 2012 de l'espéranto en France



Bienvenue en Loire Atlantique !

Le Congrès 2012 de l'espéranto en France aura lieu du 25 au 29 mai 2012 à Saint-Aignan de Grand Lieu, à proximité de la métropole nantaise.

C'est le château de la Plinguetière (photo ci-contre) qui accueillera le congrès.



Au programme, en plus des réunions statutaires des associations participantes, des conférences, des ateliers, des spectacles et des excursions, comme la visite de Saint-Aignan, la découverte du lac et de Saint-Philbert, la visite de Nantes, une promenade en bateau sur l'Erdre...



Réservez dès maintenant ces dates dans votre agenda !

**espéranto
France**

4 bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS • à 50 m du Métro Bastille
Tel. 09 51 77 18 33 (tarif local) • info@esperanto-france.org

